016-38655 55

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 1999 | 70-a jaro, n-ro 1 (1123)

ISSN 1163.0442 | *Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem* | MENSUEL/MONATA

Ĉu ili lernis Esperanton ?




Julie kaj Melissa

Neatendita letero el Ĉinio, paĝo 3.

- **Serĉataj 2000 marŝemuloj , p. 5**
- **Ruboj en Eŭropo, p. 6**
- **Ĵus aperis, p. 3**
- **El la SAT-sidejo, p. 9**
- **Kongresinformoj, p. 10-11**
- **Kie estas via loko ?, p. 8**

EKSKLUZIVE



Intervjuo kun s-ro Babiĉka, viktimo de stalinista reĝimo, kondamnita pro Esperanto !

paĝo 4 .

SAT SUR TTT :http://www.worldnet.fr/~sat-esp/

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

EL LA REDAKTEJO...

Karaj gekamaradoj,

ni ĵus eniris en la antaŭlastan jaron de la 20-a jarcento, kaj jen ĝia unua numero de Sennaciulo. Mi esperas ke ĝi estos interesa ĉar abundas diversaj informoj pri kio ni povas danki al kelkaj el vi, kiuj sendis ilin. Ni esperu ke vi daŭrigos kaj ĉiu venonta numero estos ankoraŭ pli interesa. Eble vi rimarkos kelkajn diferencojn en la teknika aspekto de la gazeto. Fakte, ni estis devigataj ŝangi nian enpaĝigprogramon kaj mi ankoraŭ lernas uzi ĝin. Tiu ĉi numero estas la unua rezulto de tiuj klopodoj. Mi esperas, ke vi estos indulgaj pro eventualaj eraroj aŭ fuŝoj.

Fine de la lasta monato finiĝis la plej favora periodo por aliĝi al la kongreso. Malgraŭ tio, ne multaj aliĝis ĝis nun. Ne atendu la lastan momenton kaj helpu al la organizantoj pli facile kontentigi viajn dezirojn. Do aliĝu kiel eble plej baldaŭ. La kongreso estos tre interesa kaj en belega loko. Vi ne bedaŭros. Amike via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T. , administrejo kaj redaktejo:67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: sat-esp@worldnet.fr.
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 50,68 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

USONA PERANTO - NOVA ADRESO

Nia usona landa peranto ŝanĝis sian adreson kiu nun devus esti daŭra. Jen ĝi:

Dan GLASS
26 W. 10th St. #1601
ST. PAUL, MN 55102

Eraro: En la Komuniko de PK.(Sulo n° 11, p. 111, ni eraris pri k-do R. Corsetti. Li estas vicprezidanto de UEA kaj ne ĝenerala sekretario. Ĝenerala sekretario estas s-ino Michella Lipari. Ni petas pardonon al ili ambaŭ.

KOTIZOJ 1999 POR HUNGARIO

Pro iu programa eraro el la Kotizlisto 1999 elfalis linio pri Hungario. Ni petas pardonon al niaj hungariaj gekamaradoj kaj al nia landa peranto, k-do KOVACS Béla. La kotizoj por 1999 ne ŝanĝiĝis, do jen la mankanta linio:

Hungario: Béla Kovacs, Béla kiraly u. 44, HU-7400 Kaposvar
Plena kotizo 1200,00 HUF ; Nura abono al Sulo 1300,00 HUF

NOVAĴO ĈE LA BROŜURSERVO DE SAT

En subskripcio (aperos en 1999)

Liberecanaj Pensoj (anarkiisma kompendio) en du volumoj, ĉ. 400 p. Ilustrita, kun. i.a. jenaj tekstoj:
La liberecana Penso (citaĵoj) - Liberecanaj Vivkonceptoj pri socio-organizado (FONTAURA). Rezolucioj de la kongreso de St. Ismier. Statuto de I.L.A. (A.I.T.) - La Parlamentisma Iluzio (C.A. LAISANT) - La Piramido de l'Tiranismo (DOMELA-NIEUWENHUIS) - Revolucia registaro kaj aliaj tekstoj (KROPOTKIN) - Anarkio kaj Organizo (MALATESTA) - Imaga dialogo MARKS-BAKUNIN (M. CRANSTON) - Memvola Servuto (LA BOETIE) - DURRUTI, sinonimo de la Hispana Revolucio - La homa animo sub socialismo (O. WILDE) - En anarkiista socio, kiel kondutos la individuo? (J. GRAVE) - La Anarkiistoj (Seb. FAURE) - La pledo por Francisko Ferrer - Pripensoj pri Anarkiismo (Maurice FAYOLLE)...
Prezo inkluzive la afrankon : 120,00 FRF.

Jurij Lobov

MALLONGE DIRANTE

En nia lando totalism' sufiĉis,
Similis ege al la juĝ' de Linĉ'.
Mi objektive tiam - malfeliĉis,
Sed subjektive vivis - en feliĉ'.

La totalism' ekmortis. Sed malriĉ'
Viviĝis ree kaj malsato kriĉas,
Mi objektive vivas - en feliĉ',
Sed subjektive - malfeliĉas.

El PREM-bulteno n° 4(7) novembro 1998.
Esperantigis: Solomon Vysokovskij



AMIKECA RETO

nun ne plu eblas aliĝi al la reto, certe nun en la presejo. Eblas antaŭmendi ĝin laŭ favora prezo: 60 FRF (10 €), ĝis la 31-a de decembro.
Aĉetu ĉe perantoj aŭ libroservoj, aŭ ĉe la centro :
AMIKECA RETO, 88 rue Victor Hugo, FR-37400 AMBOISE
Poŝtkonto: 36 34 74 G La Source (FR).

ETERNA BEDAŬRO

Nia redakcio ricevis la suban tekston de nia ĉina kamarado Han Yi kiu vere surprizis nin. Laŭ lia letero, li korespondis kun du junaj belgaj knabinoj Julie kaj Melissa, viktimoj de pedofilo, pri kiu informis monda gazetaro. La korespondado okazis en Esperanto. Kvankam ni ne dubas pri la sincereco de nia kamarado, ni volis ekscii pli. Bedaŭrinde, laŭ la informoj el Belgio, inter esperantistoj ne estas konate, ke la knabinoj lernis Esperanton. Kiu estas Francis? Ĉu iu scias pli ?

La Redakcio.



Han Yi

La 5-an de julio 1998 aperis en ĉina ĵurnalo «Wénzhai bao» artikolo pri belgaj knabinoj Julie kaj Melissa, mortigitaj de krimulo kaj enterigitaj en lia ĝardeno, en junio 1995. La krimulo estis arestita en aprilo 1998. Tiu afero provokis tumulton en la belga socio kaj la ministro pri la justico devis demisii. Leginte tiun artikolon mi estis ŝtoniĝinta. Ĝi provokis ĉe mi konsciencriproĉon kaj eternan bedaŭron.

Fakte, mi ricevis tute neatendite leteron de Julie kaj Melissa en januaro 1995. Ĝi estis skribita en Espereanto.

Jen ĝia enhavo:

«Kara onklo,

kun emocio ni skribas al vi, ĉar ni estas unua foje skribas al fremdlandano. Ni ambaŭ estas nur 8 jara. Kaj revas al la estonteco. Vi, plenaĝuloj donas al ni la belan mondon. Ni kredas, ke la mondo pli kaj pli bela. Respondu!

Julie kaj Melissa»

Kun naiveco la letero estas plena de ĉasado al la vivo. Tio esprimas la puran animon kaj spiritan honestecon. En la letero estas fotografaĵo de Julie kaj Melissa. Belaj kaj amindaj, la knabinoj aspektas kiel birdetoj, kiuj elŝovis ŝtele la kapojn el la nesto por spekti la belan mondon kaj esperi rikolton de la agrablaĵo.



Julie kaj Melissa

Ĝis la fino de 1995 mi reskribis al la belaj belgiaj knabinoj por saluti ilin okaze de la Kristansko.

En januaro 1996, mi ricevis leteron skribitan de Francis. Li skribis: *«Julie kaj Melissa soifis pri via letero. Bedaŭrinde, ili neniam legos ĝin, ĉar ili jam foriris el nia mondo.»*

Tiu informo terure ŝokis min. Mian koron eniris eterna bedaŭro ĉar mi ne respondis pli frue. Pardonu, belgaj knabinoj ! Akceptu mian funebran saluton! Mi nun estas via amiko kiu neniam forgesos vin.

Han Yi

Ĵus aperis...



UEA eldonis gvidlibron de UNESKO pri «Homaj Rajtoj»

Leah Levin: Homaj rajtoj : demandoj kaj respondoj. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Ilus. Plantu. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21 cm. Prezo: 24,00 NLG (triona rabato ekde tri ekz.)

Ĝustatempe por omaĝi la 50-an datrevenon de la universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiun oni festis la 10-an de decembro, aperis ĉe UEA la Esperanta eldono de «Homaj Rajtoj: demandoj kaj respondoj». La angla originalo de tiu ĉi libro, estis unuafoje eldonita de Unesko en 1981. Antaŭ ol aperi en Esperanto, tiu populara libro estis eldonita en 16 aliaj lingvoj.

Leah Levin estas elstara brita specialisto pri homaj rajtoj. Ŝia verko estas bonega lernolibro pri la vasta problemaro de homaj rajtoj. La unua parto de la 140-paĝa libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj. Specialan atenton ricevas la evoluo de la diversaj proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj la edukado pri homaj rajtoj. La dua parto klarigas, unu post la alia, la enhavon kaj signifon de ĉiu el la tridek artikoloj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La verko estas ilustrita per tre amuzaj karikaturoj de konata franca karikaturisto, Plantu.

EKSKLUZIVE

KONVERSACIO KUN SINJORO BABIĈKA

Politika arestito el la komunisma koncentrejo - pro Esperanto


Jaromir Babiĉka festis antaŭ nelonge sian naŭdekjariĝon - kiel aliel ol en la cirklo de esperantistoj - fervojistoj. Li restis fidela al la ideoj de Esperanto kaj al la fervojo dum la tuta vivo, kvankam ĝuste tiu fideleco al Esperanto kaj internaciismo faris el li «spionon», kaj li estis arestita por dudek jaroj en la plej teruraj kondiĉoj de komunisma koncentrejo, tiu de Jachymov. Dum nia lasta vizito ĉe li, ni petis lin pri intervjuo precipe por Sennaciulo. Jen ĝi.

Stanjo: Kiam kaj kiel vi esperantiĝis?
Babiĉka: Kiel viceŝtro de la fervoja stacio Podmokly (nuna Decin) iu Franco, serĉante iun Ĉeĥon, montris al mi lian leteron skribitan en nekonata lingvo. Tio okazis en 1945, post la milito. Mi miris, pri kiu lingvo temas: la francan mi lernis, sed ĝi ne estis - kaj tamen mi iom komprenis la enhavon. Post sciigo, ke temas pri la internacia lingvo Esperanto, mi rapide ellernis ĝin. Post unu jaro mi jam komencis ĝin instrui kaj fondis Esperanto-klubon de lokaj fervojistoj «Ĉiam antaŭen».

Petro: Ni ĉiuj scias, ke vi estis akuzita pri agado kontraŭ socialisma reĝimo. Sed kiel efektive oni vortumis vian «kulpon»? Kaj kiam kaj kiel oni sciigis tion al vi?
Babiĉka: La citado de koncerna paragrafo estis konciza: spionado por okcidento per koditaj vortoj en Esperanto-leteroj kaj patrujperfido. Tio okazis en septembro 1953, dum mia kuracado en banloko Marianske Lazne. Post la reveno de promeno atendis min du civil-policanoj kaj sen klarigo forveturigis min en la malliberejon en Litomerice, kie mi estis esplordemandata ĉiutage dum kvar monatoj ĝis la fino de la tribunalo. Samtempe kun mi estis arestitaj ankaŭ kelkaj miaj Esperanto-lernantoj, kiuj «ricevis» iom malpli da jaroj.

Stanjo: Kiel ofte vi povis havi kontaktojn kun viaj familianoj? Ĉu vi rajtis viziti hejmon aŭ almenaŭ ili viziti vin?
B.: Eliri por viziti familion estis neebla. La rajto akcepti viziton de unu familiano estis unufoje en du monatoj dum 10 minutoj tra fera kurteno, dum prizorgo de gardisto, kondiĉe ke dum tiuj du monatoj la konduto estis senriproĉa. Mi mem sukcesis ricevi tiun permeson dufoje dum la tuta restado tie.

Stanjo: Kiam vi sukcesis revoki la tribunalon kaj liberiĝi, alivorte, kiom longe vi devis efektive suferi?
B.: Post la verdikto de la tribunalo konsilis al mi mia advokato ne apelacii, ĉar liaopinie temus pri vana elspezo de mono kaj tempo. Li promesis revoki la kazon en la momento, se la politika premo iom mildiĝos. Kaj tion li efektive faris en la jaro 1956 post falo de Stalina personeca kulto. Do, en februaro 1957 mi estis liberigita kaj du monatojn pli poste, mi estis deklarita senkulpa dekomence.
Tamen nenian kompenson mi ricevis kaj ne povis trovi laboron. Sed tio jam estas alia historio.



Jaromir Babiĉka en konversacio kun SAT-peranto por Norvegio kaj honora prezidanto de IFEF, Per Engen, kies unua korespondanto en Esperantio kaj proksima amiko J. Babiĉka fariĝis jam antaŭ la akuzo pri spionado. Ilia amikeco daŭras ĝis hodiaŭ.

Foto: J. Giessner

Petro: Mi scias, de la antaŭaj interparoloj kun vi, ke vi ne tro volonte rememoradas tiujn jarojn kaj mi bone komprenas kial. Tamen, ĉu vi povus priskribi al la legantoj tipan labortagon en la malliberejo?
B.: Ni laboregis en uranminejoj Jachymov 8 horojn tage, en tri laborperiodoj. De nia prizono ni estis gvidataj en fermita taĉmento en vicoj po 7 personoj, tiom dense, ke ne eblis fari paŝon aliel ol ĉiuj samtempe, ĉirkaŭigitaj per ŝlosita ĉeno, kiun devis ĉiuj flankmarŝantoj teni kaj ĉirkaŭ ni iris gardistoj kun hundoj. Ni ja estis la plej danĝeraj krimuloj! En la profundaj minejoj ni peze laboris en varmego. Post elminejiĝo ni devis longe atendi alvenon de gardistoj por esti eskortitaj reen al la arestejo, ofte eĉ horojn, precipe se frostis.

Stanjo: Kaj ĉu vi ankoraŭ povas rememori kion vi kutime ricevadis por manĝi?
B.: Rilate manĝon la plej terura estis la esplordemanda tempo, kiam la manĝo estis preskaŭ nenia, kaj krome apenaŭ manĝebla. Dum la laboro en minejoj ni ricevadis jam iom pli. Krome, ni rajtis manĝi pli da pano, pro bona konduto eĉ aĉeti vaflojn. Estis klare, ke ni estis bezonataj fortaj. Ne ofte, tamen iam, ni ricevis eĉ viandon.

Petro: Ĉu vi povas rememori unu eksterordinare malagrablan okazaĵon kaj almenaŭ unu bonan travivaĵon de la koncentrejo?
B.: Mia unua Kristnasko en Jachymov estis vere nekredebla. Irante al latrino mi pretervidis, pro falanta neĝo, gardiston kaj ne salutis lin. Sekvis puno: kvar tagoj en soleco. Mi estis ĵetita en ĉelon kun kradita fenestro sen vitraĵoj, do neĝis internen kaj frostis. Antaŭ eniri la ĉelon mi devis demeti ŝuojn, do resti nudpieda. Ene estis kuŝbreto, tamen sen kovrilo. Por manĝi, mi ricevis unu peceton da pano por la tuta tago kun unu kruĉo da iom varma akvo. Du tagojn mi eltenis marŝi kaj moviĝi por ne mortfrosti, poste mi kuraĝis kriaĉi, ke mi volas iri al la kuracisto. La gardisto malkonsilis tion al mi asertante, ke sekvos



El la Mondo

Serĉataj 2000 marŝemuloj

Pacomarŝo de la Internacia Tribunalo de UN en Hago al la NATO-stabejo en Bruselo por la nuligado de ĉiuj nukleaj armiloj.

Inter la 16a kaj la 30a de majo 1999, sur la sojlo de la nova jarmilo, la internacia reto Por Patrino Tero alvokas kiel eble plej multajn homojn kaj organizojn partopreni al la gravega pacomarŝo cele al totala nuklea malarmado. La manifestacio okazos tuj post la «Haagse Platform voor de Vrede» (Haga Platformo por la Paco), grava NRO-konferenco (Neregistara Organizaĵo) okazonta en Hago inter la 10a kaj 15a de majo 1999. La celo de la konferenco estas, pridiskuti kaj plani la nuligadon de milito en la 21a jarcento. Oni atendas milojn da partoprenantoj el la tuta mondo. En Nederlando kaj Belgio oni jam faris la unuajn kontaktojn, kun la espero kunigi kaj partoprenigi kiel eble multe da organizoj.

Post tiu ĉi konferenco, Por Patrino Tero volas iri surstraten 2000-ope, por evidentigi la ligon inter la Internacia Tribunalo de UN en Hago kaj la stabejo de NATO en Bruselo. La alveno de la marŝo en Bruselo, je la 26a de majo, ankaŭ estos la komenco de kvartaga pactendaro kiu daŭros ĝis la 30a de majo 1999.

Pol D'Huyvetter, kampanjogvidanto ĉe Por Patrino Tero kaj iniciatinto de la manifestacio, diras: «Ni revas kun 2000 partoprenantoj marŝi por tuja komenco de multlateraj intertraktadoj pri UN-interkonsento, kiu malpermesas nukleajn armilojn. Ni postulas ke la membroŝtatoj de NATO plenumu siajn internaciajn devojn, kiel fiksite en julio 1996 de la Internacia Tribunalo. La politiko de NATO estas hipokrita kaj krima. Estas tempo ke la mondo ekkomprenu ke NATO estas la plej granda baro por interkonsento pri nuligado de nukleaj armiloj. Per ĉi piedmarŝo ni portos la internacian rajton al la krimuloj en Bruselo. La marŝo fariĝu mejloŝtono por Abolition 2000, la mondvasta organizo kiu batalas kontraŭ nukleaj armiloj.

La piedirado komenciĝos ĉe la ŝtuparo de la Internacia Tribunalo en Hago, per manifestacio dimanĉe la 16an de majo 1999. La 8an de julio 1996 tiu ĉi tribunalo, la plej potenca laŭleĝa organo en la mondo, decidis, ke «ne nur la uzado sed ankaŭ la minacado per nukleaj armiloj ĝenerale estas kontraŭa al la internacia juro» La kortumo ankaŭ unuanime deklaris ke ekzistas leĝa devigo intertraktadi por estigi interkonsenton kiu malpermesas ĉiujn nukleajn armilojn, kaj tion ĝi faris referencante al artikolo IV de la Konvencio pri Nedisvastigado.

Dum la publikaj kunvenoj estas planitaj personaj atestaĵoj de i.a. Hibakuŝa-oj (postvivintoj de la atombombo) el Hiroŝima kaj Nagasaki, de reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, la unuaj viktimoj de uranio-ekspluatado kaj nukleaj provoj, ankaŭ la juraj ekspertoj pri internacia rajto.

Post la alveno de la marŝo ĉe NATO en Bruselo okazos i.a. manifestacioj kaj maldormado. Ni ankaŭ faros inspekton de preparoj de militkrimoj fare de la NATO Nuklea Plangrupo. La marŝantoj tute konkrete petas, ke difinitaj dokumentoj de la Nuklea Plangrupo estu publikigitaj, i.a. la lokoj kie troviĝas nukleaj armiloj, ilia potenco, la celoj, kostoj ktp, ktp.

Por Patrino Tero ricevis jam plenan apogon el diversaj anguloj por la marŝo. La eŭropean Youth for Action, Friends of the Earth International, International Peace Bureau, Women International League for Peace and Freedom, kaj la Skota Campain for Nuclear Disarmement estas jam kelkaj grupoj kiuj apogas la manifestacion. Por Patrino Tero esperas ricevi la plenan apogon de Abolition 2000, la mondvasta reto de grupoj kontraŭ nukleaj armiloj, inter kiuj 1000 NRO-oj ligitaj mondvaste.

Dum la aŭtuno ni plenforte laboros pri serĉado de regionaj kontaktoj. Ĉi-momente ni havas kontaktojn en Belgio, Kanado, Ĉilio, Germanio, Finnlando, Francio, Islando, Kamerunio, Barato, la Centra Oriento, Nederlando, Norvegio, Pakistano, la regiono de la Pacifiko, Rumanio, Ruslando, Skotlando, Siera-Leono kaj Usono. La regionaj kontaktoj prizorgas la sciigon kaj la transporton al Hago. Por Patrino Tero invitas homojn fari la piediradon en malgrandaj grupoj, precipe sub regiona organizado. En Belgio kaj Nederlando ni nepre bezonas homojn kiuj povas helpi en la diskonigado, kontaktado de lokaj organizoj kaj registaroj, prizorgado de la itinero kaj kampadebloj. Se vi emas kunlabori kontaktu POR PATRINO TERO (Voor Moeder Aarde).

La manifestaciantoj marŝas pli malpli 20km tage, dum periodo de 10 tagoj. Oni antaŭvidas moveblajn kuirejojn, helpveturilojn por la bagaĝo, unuan helpon en kazo de vundetoj ktp, ktp. Ankaŭ estas ke antaŭviditaj muzikistoj akompanu la manifestacion.

Por Patrino Tero estis fondita en 1991 kaj organizis ĝis nun du transkontinentajn pacmarŝojn de 5500 km: en 1992 tra Usono kaj en 1995 tra Eŭropo. Ni daŭrigas organizi marŝojn por malarmado, mediprotektado kaj memmastrumaj rajtoj de indiĝenaj popoloj.

Por pliaj informoj, direktu vin al :

VOOR MOEDER AARDE
Lange Steenstraat 16-d
BE-9000 Gent

Jakvo

---

eĉ pli teruraj kondiĉoj kaj nova puno. Tamen mi insistis kaj estis gvidata al la kuracisto, kiu permesis, ke mi ricevu unu kovrilon. Mi estis gvidata en la stokejon, kie mi vidis amasegon da kovriloj ĝis la plafono. Mi ekvidis, ke unu estas pli dika, do elektis ĝin, kio verŝajne savis mian vivon. Temis pri du kovriloj falditaj kiel unu, mi do kuraĝis eĉ dormi kaj ne mortfrostis.

Kaj la plej bona travivaĵo? Kiam ni eksciis de novaj arestitoj, ke en Hungario komenciĝis kontraŭrevolucio kaj ke stalinistoj verŝajne estos forigitaj. Baldaŭ ni sentis pli homecan konduton, ĝis iu tago kiam mi estis vokita al la oficejo, kie oni anoncis al mi, ke mi estas libera kaj povas iri hejmen. Mi ne kredis, opiniante, ke temas denove pri iu kruela ŝerco fine de kiu ili verŝajne forpafos min kiel fuĝinton, sed la novaĵo fariĝis vero!

Stanjo: ĉu post tiom da suferoj, kiujn vi devis sperti pro Esperanto, vi bedaŭras, ke vi ellernis ĝin?

B.: Ne. Male, Esperanto portis al mi sencon de mia vivo. Per ĝi mi ekkonis la plej bonajn amikojn kaj ĝi eĉ savis mian menson dum tiuj malfacilaj kvar jaroj: ni rajtis pruntepreni unu libron por ĉiuj du monatoj por ke ni vivu en barakoj kulture. Mi tralegis ĝin ĉiam rapide kaj poste tradukis ĝin, kvankam sen papero, nur por ekzerci la cerbon, kelkfoje en Esperanton, antaŭ ol mi povis ricevi la novan.

Ni kore dankas por viaj respondoj kaj deziras al vi (certe ankaŭ nome de la legantoj de Sennaciulo) sanon kaj bonhumoron ankoraŭ dum pluraj jaroj.

Intervjuis: Petro kaj Stanjo Chrdle

Rimarko: ne ĉiuj havis tiel bonan vivradikon kaj revenis hejmen...
Ĉiujn viktimojn, sed ankaŭ verajn krimulojn, kiuj turmentis senkulpajn politikajn arestitojn rememorigas muzeo, kiu estas celo(krom aliaj viđindaĵoj) de la duontaga ekskurso «Jachymov» dum ĉijara SAT-kongreso.

EKOLOGIO

NATURPROTEKTADO

RUBOJ EN EŬROPO

Ruboj estas moderna koncepto de nia produktema, konsumema kaj urba socio. Pasintece, en kamparo, ruboj ne vere ekzistis. Oni uzis bazajn simplajn materialojn kiujn oni ĉiam reuzis: ligno (mebloj), metaloj (iloj), tero (brikoj, mortero, ceramiko).
La unuaj problemoj rilate al ruboj komenciĝis paralele kun la naskiĝo de urboj.
En ĉiu vilaĝo, oni unue dediĉis kampon por forlasi rubojn sur la grundo mem. Kompreneble, tiu loko malbonodoris kaj tre malpuris. Por ne vidi ĝian malbonan aspekton, oni poste decidis fosi la kampon por enterigi la rubojn. Oni nenion plu vidis, ĉiuj kontentis. La problemo estis kaŝita.
Tiam, la ruboj ĉefe estis organikaj (ekz. ŝelaĵoj), ĉar metaloj estis reuzataj de forĝistoj kaj lignoj estis bruligitaj por hejtado. Ruboj do rapide putris, memdetruiĝis kaj enmiksiĝis en la tero kiel humo. Tiun proceson prizorgas la multnombraj bakterioj kiuj amase troveblas en la naturo.
Kompreneble, oni enterigis rubojn sen antaŭstudi la subgrundon. Tial, kelkfoje, la subteraj riveroj poluiĝis kaj transportis la poluojn plurajn kilometrojn for. Sekve, putoj uzitaj por trinkakvo (kelkfoje por tuta urbo) estis fermataj por publika saneco. Kun la industria evoluo, oni eĉ enterigis industriajn rubojn...
En la dudeka jarcento aperis novaj materialoj. Plastoj nun plene partoprenas nian vivon. Pro grandega diverseco de plastoj, oni scipovas fabriki preskaŭ ĉion el plasto (de vidotuko al aviadilo). Vitroj, kiuj delonge ekzistis, nun posedas tre variajn kvalitojn kiuj multobligas siajn uzadojn. Same pri metaloj, paperojkartonoj, tukoj, morterojcementoj...
Ni eniris mondon kiu ĉiam serĉas novaĵojn : tio nomiĝas progreso. Samtempe, ni senĉese produktas kaj konsumas. Ekde kiam io iom malnovas, ni forĵetas ĝin por aĉeti la plej novan. Nun, ni tutnormale vivas kun ruboj. Kaj laŭ nivelo de industria evoluo, landoj produktas malsamajn kvantojn da ruboj :
* urba finlandano : 2 kg da ruboj tage
* kampara portugalo : 0,5 kg tage.
(Usono estas la plej produktema lando. Inverse, landoj el Mezafriko estas la malplej produktemaj).
Landaj estraroj do decidis studi la problemon. En Nederlando kie la grundo estas plejparte sub mara nivelo kaj pro tio tre proksima de la subtera akva rezervejo, ili rapide komprenis tion. Ili komencis bruligi la rubojn en industriaj fornoj. Kaj por ŝpari monon en transportado de ruboj, tiuj fornoj situiĝis ĝuste apud la urboj. Tiu ĉi solvo ne plu detruas pejzaĝon, nek poluas grundon, nek akvon . Tamen ĝi amase produktas gasojn kaj cindrosolidaĵojn. Samtempe kun la evoluo, veturiloj kaj industrioj pli kaj pli elĵetas atmosferajn gasojn kaj polvojn.
En sudaj kaj varmaj landoj, dum somero, pro fizika fenomeno, la gasoj restas lokataj kvazaŭ ili estus premataj : neniu vento estas, ili ne plu disvolviĝas. La sama okazas en urboj situantaj en fermata valo : la poluo ne povas superpasi la montetojn. Tiel estas la problemo por grandaj ĉefurboj kiel Ateno aŭ Romo. Tamen en decembro 1952, tute escepte pro ekstremaj meteorologiaj kondiĉoj, tiu fenomeno okazis en Londono dum du semajnoj kaj kaŭzis 4000 mortojn...



En tiuj atmosferaj elĵetoj estas preskaŭ ĉiu ebla gaso kaj la Mendelejeva tabelo[1] estas preskaŭ komplete reprezentita !
Oni jen povas detekti acidajn gasojn (sulfura, klora, fluora...). Acidoj ne estas toksikaj sed ili agadas kiel eroziilo kaj skrapilo. Ŝtonoj estas iom post iom manĝitaj, montrantaj poste truetojn. Kelkaj malnovaj monumentoj estas tiel grandskale atakataj.
Per ventoj, la acidaj nuboj transiras ĝis 200 km kaj pluve detruas arbarojn. La acido «bruligas» kaj fordetruas la foliojn (arboj perdas tiel siajn spirilojn kaj lumkaptilojn). Ĝi ankaŭ dissolvas la jonojn de la grundo kiuj estas la nutraĵo de la kreskaĵoj. Ili foriras per akvo ĉu profunde en la teron, ĉu al riveroj. Jen vegetaloj estas vunditaj je folioj kaj ne plu povas nutri sin. La rezulto estas kampoj de nudaj trunkaroj sen folioj....

Tamen, nun estas tre facile rimedi kontraŭ tio. Antaŭ ol esti elĵetitaj, la fumoj trapasas malacidan kalkan likvaĵon kiu neŭtraligas ilin[2]. Tiu tutbaza sistemo estas tre malmultkosta.

La fornoj elĵetas ankaŭ multe da polvo kiu ne nur nigrigas la murojn kaj la monumentojn, sed kiu ankaŭ estas ensorbita per nia nazo. La infanoj, maljunuloj kaj astmuloj ĉefe estas ĝenataj per pulmaj kaj spiraj konsekvencoj. Tamen nun, ĉiuj fornoj posedas filtrilojn kiuj povas esti tre efikaj : tunoj da polvo estas tiel kaptitaj. Metaloj (plumbo, kromo, arseniko...) kiuj povas esti toksegaj, same estas filtrataj ĉar ili ofte gluiĝas al la polvo. Por plibonigi la sistemon, oni aldonas elektran filtrilon: jonaj metaloj estas altiritaj laŭ poluso. Sed tio konsumas energion kaj monon.

Antaŭ nelonge, oni aŭdis pri dioksinoj-furanoj (molekuloj kun klora elemento). Tiuj estas preskaŭ nedetekteblaj pro ilia tre malgranda kvanto (= 0.1 ng/m^3 !) [3]. El ducent dek, deksep estas konataj pro kancerdonemo. Oni supozas ke la aliaj same estas danĝeraj, sed nenio estas pruvata. Por filtri ilin, oni uzas «aktivan karbonon» kiu estas tre ege kosta fajna materialo. Do, ĝis nun, la plej simpla metodo por ne havi tiujn molekulojn estas formeti el la forno ĉiujn klorajn rubojn (ĉefe plastojn).

La plej komuna speco de gasoj estas la karbonaj. Molekuloj kiuj posedas plurajn karbonajn atomojn venas el malkompleta[4] konsumo. Tiuj interagas kun la nitrogenaj oksidaĵoj kaj fabrikas novajn poluojn tre diversajn. Inter ili, estas ozono, konata pro la ozona tavolo de la atmosfero (je 30 km da alteco) kiu protektas Teron kontraŭ la sunaj radioj. Sed ĝi estas tre oksidema (O_3 : tri oksigenaj atomoj) kaj tiel «bruligas» la okulojn kaj la internan haŭton de nazo-gorĝo-pulmoj.

Sed se hipoteze ĉiuj filtriloj kaj sistemoj funkcius kiel plena barilo, tamen restos la finfina molekulo de kompleta konsumo: CO_2, dioksigena karbono. Produktita de spirado kaj de industrioj, sorbita de verdaĵoj kaj de maro, ĝi eksponenciale kreskas jam de du jarcentoj. Tiu fenomeno kaŭzas la kreskadon de la forceja efiko[5].

Post petrola mondkrizo de la 70aj jaroj, energio iĝis tre kosta. Skandinaviaj landoj, kiuj havis grandan bezonon dum vintro por varmigi domojn, tuj ekpensis plene uzi la energion kiu venis el ruboj. Sudaj landoj iom post iom decidis la samon. Ruboj estas nun uzataj por produktado de varma akvo aŭ de elektro. Sed la tuta energia potenco de ruboj ne estas eltirita, ĉefe en landoj kiuj posedas petrolon (kiel Norvegio) aŭ atomenergion (kiel Francio), ĉar tiu energio malpli kostas. Tial por multaj landaj estraroj, ruboj ne plu estas oficiala problemo, sed energia avantaĝo (2kWh/kg) : ĝi ŝparas petrolon : mazuto (12 kWh/kg), naturan gason (14 kWh/kg), karbon (9.5 kWh/kg), lignon (5 kWh/kg)...

Kompreneble, tiuj landaj estraroj samtempe diras ke ili intencas plibonigi la atmosferajn elĵetaĵojn kaj konstrui novajn rubfornojn geografie lokatajn por ne polui la urbojn. Eŭropa direktivo de 1989 indikas la limojn de tiuj elĵetaĵoj. Ĉiu membra ŝtato devas respekti ilin. Kelkaj eĉ plimalaltigis ilin. Ekzemple pri polvoj, Eŭropo : 30 mg/m^3, Germanio: 10 mg/m^3, Nederlando : 5 mg/m^3.

Malgraŭ tio, konsekvencas damaĝoj sur la naturo, sur la domkonstruaĵoj kaj sur la homoj kiuj ĉiun tagon sorbas polvon, toksaĵojn, oksidaĵojn, kancermalsanojn kaj ktp-aĵojn.

Lisa Bannier

1.: kemia tabelo, ordiganta ĉiun elementan atomon
2.: formetas acidecon
3.: 1 ng = 0,000 000 001 gramo
4.: pro manko de oksigeno
5.: varmiĝo de la Tero.

Venonta artikolo : pri reuzado de materialoj kaj moderna enterigado de ruboj.

NEKROLOGO

Ni ĵus eksciis ke en Dortmund (DE) mortis la 4-an de oktobro nia malnova membro, kamarado

Willi PETIG (matr. 23.046)

Ni kondolencas al lia edzino kaj al lia fratino Herta Bellen.

*****

La 18.10.1998 mortis en Francheville (FR) , 98-jara, nia kamarado

René LEMAIRE (matr. 34.831)

Ni kondolencas la familianojn.

*****

La 8-an de novembro mortis en Cenon (FR) nia malnova membro, 76-jara, kamaradino

Galta ROBERT (matr. 30.841)

Niaj pensoj iras al nia kamarado Léo, ŝia esperantista filo Marcelo, familianoj kaj al la tuta Ĝirondia E-kolektivo.

****

La 07.11.1998 mortis en Colonzelle (FR), nia malnova membro, kamarado

André (Miketo) DELAYE (matr. 21.109)

Ni kondolencas al la edzino kaj aliaj familianoj.

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (FRF) Ge-Lascours 60,00; Ge-Rapley 500,00; MKE 500,00; Kolekto okaze de renkontiĝo 7000,00; Boré 42,50; Ge-Rapley 542,50; Bes 95,00;

En Belgio (BEF) S. De Weerd 1600,00;

POR ŜTOPI LA BREĈON

MKE 315,00

SENNACIECA HELPSERVO

MKE 185,00; Peyraut 195,00;

FONDUSO NOVA PIV

Ge-Lascours 50,00 FRF; J. Fourtané 500,00; E. Dazun 10.000,00; Lilio Grandière 1000,00;

NOVA RETADRESO

Bannier Lisa : *lisa.bannier@wanadoo.fr*

Bona ekzemplo

KIE ESTAS VIA LOKO ?

El "BULTENO" - organo de Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio , n° 4/1998.

Neniu atendu "universalan" respondon. Sed, permesu al mi, ke mi ekspliku iom mian percepton - ekzemplon de mia kvardekjara E-vivo. Ne estas mia intenco raporti pri miaj apartaj motivoj eklerni Esperanton. Mi faris tion aŭtodidakte, kvankam siatempe ne ekzistis la nunaj helpiloj. Najbaraj parolantoj ne estis facile kontakteblaj kaj tial mi kontrolis mian prononcadon helpe de la radioelsendoj. Ĝis nun mi restis aŭskultanto dankema, ĉefe al la ankoraŭ funkciantaj stacioj: ORF kaj la Pola Radio. Estante iom politikema homo, mi okupis plurajn publikajn oficojn, en kiuj mi reprezentis kaj defendis ĉefe la laboristaron. Rekonante mian longjaran idealisman agadon sindikatan, oni nomigis min "Dumviva Honorprezidanto". kaj nia Trilandangula Komunumo, Arnoldstein, honorigis mian kunlaboron, ĉefe transliman, per nomigo de Esperantostrato, en kiu troviĝas mia loĝejo.

En nia E-movado ne sufiĉis al mi esti membro nur de niaj landaj kaj fakaj asocioj. Fake mi estas aliĝinta ankaŭ al la "Internacia Fervojista Esperanto-Federacio".

Internaciskale tamen ankoraŭ mankis al mi asocio konverĝanta kun miaj politikaj perceptoj. Nur alibiaj kontaktoj, kiujn demonstris la t.n. Socialista Internacio ne povis kontentigi min. Internacian lingvon oni neglektis, kvankam Esperanto plej reale povintus ludi la rolon de perfekta interkompreniĝo. Ĉar ĝuste Esperanton povus plej eble ekposedi ankaŭ bazlernejaj homoj. Do la laboristaro povus vere unuiĝi helpe de komuna lingvo. Fine mi trovis konforman asocion kaj mi fariĝis membro de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Ankaŭ tie mi provis kontribui per mia iama elano. Konstatinte ke SAT estas (ŝajnis) "eksmoda", mi klopodis levi iom ties prestiĝon. Evidente mi estis tro postulema kaj mi tiel provokis la demandon: "Ĉu via loko estas en SAT ?" Kaj oni rekomendis al mi iri al UEA (Universala Esperanto-Asocio). Aspektas tiel, ke tiutempe eblis esti nur "aŭ" : "aŭ"! Pasis laborplenaj jardekoj dum kiuj mi spertis, ke miaj komencaj revoj ne realiĝos tre baldaŭ. Sed sendube mi ĝuis en UEA diversnivelajn tavolojn. Imagu domegon, en kiu loĝas diversspecaj "familioj" kaj en ĝi oni trovu la siajn - la plej konvenajn, aliĝintajn al UEA.

Okazis, ke SAT-kongresis en nia Alp/Adria regiono, kies komitaton mi prezidas, kaj en kiu mi kutimas partopreni la okazantajn ĉefajn E-aranĝojn. Kompreneble mi observis la cirkonstancojn en SAT kaj mi konstatis konsiderindajn ŝanĝiĝojn. Sinsekve mi partoprenis ankoraŭ en 3 SAT-kongresoj, en kiuj mi sentis similan hejmecan atmosferon. Hejmecan ankaŭ rilate al miaj laboristaraj perceptoj. Intertempe ŝanĝiĝis ankaŭ la rilatoj inter UEA kaj SAT, tiel ke eblas esti kaj UEA-ano kaj SAT-ano. Sendube je ambaŭflankaj profitoj. Mi do realiĝis al SAT. Sed kvankam mi neniam tute perdis mian simpation al SAT - aŭ ĝuste pro tio - mi okupos estonte lokon prefere en la fono, ne plu "avangarde".

Menciindas la fakto, ke dume serioza SAT-ano fariĝis eĉ prezidanto de UEA! Des pli decas inviti ĉiujn samcelanojn veni al SAT kaj kunlabori per Esperanto por nobla celo, kio post la falo de la t.n. fera kurteno pli gravas ol iam ajn.

La reganta eksponado de la ekspluatema turbo-kapitalismo provokas urĝe konforman unuiĝon laboristaran! Kiel iam, la "laboristaj" partioj denove ne reagas konforme. Ĉu pro oportuneco, aŭ naiveco? Malgraŭ la ekzistanta riĉeco regas aliflanke ne plu pretervidebla mizero - kreskanta eĉ en la t.n. kapitalismaj landoj.


Konkretan ekzemplon pri la spirito de SAT ni trovas en "Esperanto en perspektivo". SAT ne estas politika partio. sekve ĝi prezentas ŝancon de intelekta pliriĉiĝo kaj de kresko de la socia konscio por ĉiuj aktivuloj de politikaj partioj, laboristaj organizoj, sindikatoj kaj diversaj movadoj.

Ĉu vi ekvidas vian lokon "por kaj per" ?

Stuppnig Martin, Esperantostr. 7/1, AT-9601 Arnoldstein, Aŭstrio.

Ampleksa E-vortaro por Arablingvanoj

Georgo Abraham: Klara vortaro Esperanta-araba. Rotterdam: UEA, 1998. 308p. ISBN 92 9017 056 5.22cm. Prezo 30 NLG.



Unu el la tradiciaj agadkampoj de E-movado estas antaŭenigo de la Internacia Lingvo ĉe UNO. Tamen, la bazo de tiu agado estis mankohava en unu rilato: unu el la oficialaj lingvoj de UNO, la araba, ĝis nun malhavis ampleksan E-vortaron. Tio bremsis ankaŭ la disvastigon de Esperanto en la araba mondo. Estis do nature, ke kadre de Kampanjo 2000 UEA decidis rapide agi por forigi tiun mankon.

La unua paŝo tiurilate estas la eldono de «Klara vortaro Esperanta-araba». Sur 300 paĝoj troviĝas 15000 kapvortoj. Ili estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeta ordo de la plenaj vortoj anstataŭ tiu de la radikoj, pro kio la aŭtoro nomas la verkon «klara vortaro».

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris
Tel: +33.1.47.97.87.05
Fax: +33.1.47.97.71.90

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke en la jaro 2000 ni povos eldoni ĝin.-Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

KAMPANJO 2000

Kadre de tiu kampanjo, la PK de SAT proponis al U.E.A. sendi dosieron (prezento de Esperanto, de UEA kaj de SAT, plus kelkaj dokumentoj: gazetoj, revuoj, broŝuroj) al 175 internaciaj asocioj, kiuj agadas favore al la paco.
La adresoj de tiuj organizoj estas listigitaj en iu adresaro kiu aperas ĉiujare sub la titolo: «HOUSMANS PEACE DIARY» kun subtitolo: «WITH WORLD PEACE DIRECTORY» (kun adresaro por la monda paco).
La estraro de UEA akceptis tiun proponon kaj tiu dosiero estas preparita kaj sendita danke al la kunlaborado de ambaŭ asocioj.
La prezentteksto estos dulingva : Esperanto kaj la lingvo de la sidejo de la asocio. Tiel ekzistos tekstoj en la jenaj lingvoj: angla, germana, nederlanda, franca, hispana, kaj eventuale en la ĉeĥa, flandra, dana, japana, rusa, itala.
En tiu adresaro estas ankaŭ listigitaj nomoj kaj adresoj de pli ol 1800 naciaj porpacaj asocioj. Ili situas en la jenaj landoj: Aŭstralio, Azerbejĝano, Bahamaj insuloj, Bangladeŝo, Belarusio, Belgio, Benino, Bolivio, Bosnio, Botsvano, Brazilo, Britio, Bruneo, Bulgario, Burkina Faso, Burundio, Butano, Centra Afrika Respubliko, Ĉado, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danio, Dominika Respubliko, Eburio, Ekvadoro, Egiptio, Estonio, Etiopio, Faroe Insuloj, Filipinoj, Finnlando, Francio, Gambio, Ganao, Germanio, Grekio, Grenadaj insuloj, Gruzio, Gvatemalio, Gvineo, Gujano, Haitio, Hindio, Hispanio, Honduraso, Hungario, Islando, Indonezio, Irlando, Israelo, Italio, Jamaiko, Japanio, Jemeno, Jugoslavio, Ĵordanio, Kamboĝo, Kameruno, Kanado, Kazakstano, Kenio, Kirgizio, Kolombio, Kongo, Kosta Riko, Koreio (Norda), Koreio (Suda), Kroatio, Kubo, Kipro, Kuraco, Latvio, Lebano, Lesoto, Litovio, Luksemburgio, Madagaskaro, Makedonio, Malajzio, Malio, Malto, Maroko, Maŭricio, Meksikio, Moldavio, Mongolio, Mozambiko, Nepalo, Nederlando, Nikaragvo, Nigerio, Norvegio, Novzelando, Okcidenta Samoa, Pakistano, Palestinio, Panamo, Paragvajo, Peruo, Pollando, Portugalio, Rumanio, Rusio, Salvadoro, Senegalio, Siera Leono, Singaporo, Slovakio, Slovenio, Srilanko, Sudafriko, Sudano, Svedio, Svisio, Tajlando, Taivano, Tanzanio, Togo, Trinidado kaj Tobago, Tunizio, Ugando, Ukrainio, Urugvajo, Usono, Uzbekio, Venezulelo, Zambio, Zairio, Zimbabvo.
En tiu listo oni trovas teritoriojn, precipe insulojn, aparte nomumitajn, kvankam ili estas parto de ŝtatoj: Bermudaj insuloj, Franca Polinezio, Gibraltaro, Gvadelupo, Hongkongo, Norda Irlando, Man insulo, Makao, Martiniko, Puertoriko, Reunio.
Estus oportune ke , ĉu individuoj, ĉu lokaj, ĉu nacilingvaj, ĉu laboristaj asocioj, sendu ankaŭ dosieron (kaj poste kontaktu) al tiuj naciaj asocioj.Jam de nun oni povas peti fotokopiojn de la koncernaj paĝoj ĉu al C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, ĉu al SAT-sidejo, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, aŭ akiri la tutan adresaron ĉe : HOUSMANS, 5 Caledonian Road, Kings Cross, London NI 9DX, Britio. Prezo : 5,95 britaj pundoj.

INVITO AL KUNLABORO

Post la legado de nia kongresa raporto, nia k-do Gerardo ROLLIN, prizorganto de la "Amikeca Reto" decidis provi helpi al nia redakcio produkti kiel eble plej interesan Sennaciulon. Cele al tio li proponas sin kiel redaktoron de unu el la regulaj rubrikoj en Sennaciulo. Temas pri la rubriko "TAGA VIVO" (hejme, surstrate, ferie). Li estas preta tion prizorgi kondiĉe ke niaj legantoj kunlaboru kaj sendu al li siajn kontribuaĵojn, kaj krome kondiĉe ke la aliaj sin anoncu zorgi pri aliaj temoj kiel ekz.: "LABORISTAJ LUKTOJ", "ARTOJ", "SOLIDARECAJ AGADOJ", ktp.
Ni do invitas aliajn gekamaradojn anonci sin al la SAT-seidejo tiucele. Ĉiuj ideoj kaj kunlaboro estas bonvenaj.
Por kontribui al la rubriko kiun prizorgos k-do Rollin - "TAGA VIVO", bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn al : Gerard Rollin, "Taga Vivo", 88 rue Victor Hugo, FR-37400 Amboise, Francio aŭ perrete al : *a.reto@france-association.com* indikate ke temas pri la rubriko "Taga Vivo". Se vi havas ilustraĵojn ne forgesu aldoni ilin.
Ni esperas ke tiu iniciato ne estos senresponda kaj ke tre baldaŭ ni ricevos viajn kontribuaĵojn kaj kunlaborproponojn.

La Redakcio



72-a kongreso de S.A.T.
Karlovy Vary 1999-07-24/31

Kontaktadreso por sendi aliĝilojn :
KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice
Tel.: +420.2.99112201, Fakso: +420.2.9912126, rete : chrdle@kava-pech.cz
HejmpaĝoTTT:http:/www.kava-pech.cz/.

Aliĝoj kaj pagmanieroj :
La kotizojn kaj pliajn pagojn, laŭ la elektitaj kaj menditaj servoj bonvolu pagi per unu el jenaj manieroj, kiujn bonvolu ne forgesi indiki en la aliĝilo:
* al la konto 555444-051/0100 (KAVA-PECH) ĉe Komerĉni banka Praha-Smichov.
* poŝtkonto de SAT: n° 1234-22 K, Paris.
ambaŭkaze kun klara indiko **«72-a kongreso»**.

Kotiztabelo (ĉiuj prezoj en Francaj Frankoj (FRF)

Kategorio	ĝis 99/03/31	99/05/31	poste
SAT-membro	360	430	500
SAT-geedzoj	580	690	800
SAT-gejunuloj	180	215	250
nemembroj de SAT	460	530	600
geedzoj, SAT-nemembroj	730	840	950
gejunuloj, SAT-nemembroj	240	285	330

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 30% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 50% rabaton.

ATENTU :

ALIĜILOJ KAJ MENDOJ SEN PAGOJ NE ESTAS KONSIDERATAJ

Jam venis kelkaj aliĝiloj al la SAT-kongreso sen samtempa pago aŭ kun la noto “Mi pagos surloke”. Bonvolu kompreni, ke tiajn aliĝilojn kaj mendojn ni konsideras nevenintaj pro altaj punpagoj kaze de mendo de iuj servoj kaj sekva ne uzo de ili.


Principe eblas pagi komence nur la aliĝkotizon (por povi uzi pli favorajn tarifojn) kaj sekve la ceterajn mendojn. Tamen, ne forgesu malavantaĝojn de tia poŝtupa mendo. Vi pagas dufoje la sendokostojn kaj krome povas okazi, ke la elektitaj ekskursoj aŭ kategorio de mendita loĝado ne plu estos je dispono. Precipe tiujn, kiuj deziras loĝi en la kategorio A (hotele ekipitaj ĉambroj), mi atentigas, ke estas nur 30 tiaj disponeblaj ĉambroj. Male, estas sufiĉa nombro da studentaj ĉambroj - sed 4 semajnojn antaŭ la komenco de la kongreso ni devas nuligi ĉiujn superflue rezervitajn!

Simile, se temas pri la “Invitleteroj”, se tiaj estas en iuj landoj bezonataj. Ni sendos invitleteron nur al tiu, kies pago jam atingis nin kaj en ĝi ni mencios kiel pagitajn nur tiujn servojn, kiuj vere estas pagitaj. Bonvolu ne postuli de ni mensogojn, ekzemple ke vi havas pagitajn tranoktojn kaj manĝojn por pli da tagoj ol efektive vi pagis aŭ ke ni senpage zorgos pri vi dum via restado, kion ni vere ne povas plenumi.

Celo de nia ekskurso:

Jachymov - urbeto, kiu kelkfoje fariĝis mondfama

Jachymov (legu jaĥimof) estas nun trankvila urbeto kaj bela banloko, kiu tamen antaŭ jarcentoj estis tre signifoplena kaj la dua plejgranda ĉeĥa



urbo kiu plurfoje tutmonde famiĝis.

Jam en mezepoko tie troviĝis riĉa arĝenta minejo kaj en la loka monfarejo ekestis “Jachymova tolaro”, kiu rapide disvastiĝis kiel ŝatata monunuo kaj donis nomon al dolaro, ĝis nun uzata monunuo en multaj landoj inkluzive Usonon.

En la 19-a jarcento la urbo denove mondfamiĝis pro la riĉa urania erco, de kiu Marie Curie Sklodowska helpata de sia edzo izolis radiumon kaj per tio ekstartigis novan epokon de la tekniko.

Sed la ekzisto de la radiumo havis ankaŭ aliajn sekvojn, kiuj influis la vivon de la urbo:

Jam en la jaro 1906 estis uzita radium-elemento por kuracado kaj estas uzata tiucele ĝis nun. Verŝajne Jachymov estis la unua, sed certe nun ĝi estas la plej konata radiona kuracloko en la mondo.

Urano portis ankaŭ ombron en la historion de la urbo. Pro sia riĉeco je urano, post la dua milito 100% de tiu strategia krudmaterialo estis eksportita al Sovetunio. Por la danĝera laboro mankis laboristoj, do tie devis labori unue la militkaptitoj, kaj ekde 1951 tie funkciis la plej fikonata komunisma koncentrejo en Ĉeĥio. En deko da uranminejoj en nehomaj kondiĉoj laboris kaj suferis politikaj prizonuloj ĝis la falo de Stalina personeca kulto en 1956. Rememorojn de unu el ili vi povas legi en intervjuo ĉinumere (paĝo 4).

Komunistoj sekve forigis ĉiujn spurojn post la koncentrejo, kies ekzisto estis tabua kaj ne menciebla ĝis la jaro 1989. La koncentrejon nun dokumentas kaj rememorigas novaj muzeo kaj memorŝtonoj, kiuj petas nin ne forgesi .

S.C.

FACILIGO DE PAGOJ - PERE DE POŜTO:

El pluraj landoj skribas al ni partoprenontoj, ke ne eblas sendi monon de ilia lando, kvankam tio ne estas vero (ekzemple el Pollando, Bulgario, Litovio). El multaj landoj eblas sendi monon el preskaŭ ĉiu poŝto per “Internacia poŝtpagilo MP1”. Vi pagas en via propra monunuo ekvivalenton de la dezirataj valuto kaj sumo sendataj kaj vi devas indiki kiel akceptanton:

“KAVA-PECH”, Petr Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice”,

sen indiko de la konto. Tamen, bonvolu ne forgesi indiki la celon de la pago “SAT-kongreso”.

Tiuspeca ĝiro estas tre favorpreza kaj ebla preskaŭ en ĉiuj landoj de Eŭropo (tamen bedaŭrinde ne ankoraŭ en ĉiuj: ne eblas uzi ĝin ekz. en Rusio, Ukrainio aŭ Rumanio).

Mi tre bedaŭras, ke el iuj landoj antaŭpago per poŝto ĝis nun ne eblas, kaj necesas pago per banko, kio ie eblas nur komplike kaj multekoste, sed pro jam menciita risko de punpago flanke de subliverantoj ni vere ne povas konsideri ajnan aliĝilon sen samtempa valida pago.

Por ne komplete malebligi partoprenon el tiuj landoj, eblas ja, ke iu amiko el pagipova lando, kiu bone konas la aliĝanton, al kies honesteco li aŭ ŝi kredas, provizore pagu por tiu, kiu poste egaligu sian ŝuldon ne al la kongresa kaso, sed al la antaŭpaginto.


Dua listo de aliĝintoj:

28. Charlot Vincent (FR); 29. Vojacek Josef (CZ); 30. Miluchova Amalie (CZ); 31. Kessous Djémil (FR); 32. Linke Siegfried (DE); 33. Haberland Rudi (DE); 34.Haberland Inge (DE); 35. Ledon Gilbert René (BR); 36. Ledon Symidde Schenck (BR); 37. Barkoviĉ Kreŝimir (FR); 38. Toubale Franciska (AU); 39.Heinze Bernard (AU); 40. Severa Miroslav (CZ); 41. Lynn Ronald (GB); 42. Wilfrid Jacques (GB).

GRAVA ATENTIGO

Aliĝantoj al la SAT-kongreso estas petataj, ke ili en liberan spacon de la aliĝilo indiku ankaŭ la numeron de sia pasporto, kio tre rapidigos la akcepton post la atingo de la kongresejo. Mi pardonpetas, ke ni forgesis indiki tion en la aliĝilo kaj esperante pri via kompreno ĝojatendas nian kongresumadon en Karlovy Vary.

Petro Chrdle



Ni legis por vi...



Barkoj el akvo: Elektitaj kroataj noveloj 1970-1995

Eldonis: Internacia Kultura Servo - Zagreb1998 - Mendebla ĉe UEA - Prezo: 18,80 NLG

Kroatio estas konata pro sia forta E-movado, ĝi ĵus organizis la Internacian Junularan Kongreson en Rijeka. Ne estas mirinde, ke el tiu lando alvenas nova belaspekta libro, kiu tute meritas la atenton de la esperantista leganto. Jam meze de la 80aj jaroj ELBiH eldonis Antologion de moderna kroata prozo, do la kroata literaturo ne estas tute nekonata de esperantistaj legantoj. Ĉi tiu libro proponas ĝisdatigi nian konon de la kroata literaturo per mallongaj prozaĵoj el la jaroj 1970-1995.

Jen 22 noveloj elektitaj de la kroata verkistino Julijana Matanoviĉ, de kiu la eldonisto aldonis librofine furorantan novelon. Ŝi verkis enkondukan noticon pri la nuna stato de la kroata novelarto.Ni ekscias, ke la mallonga prozo eniris la kroatan literaturon sufiĉe malfrue, konis uniformigan periodon pro la socirealismo post la dua mondmilito, renoviĝis en revuoj dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj kaj markas denove la sepdekajn jarojn. La tuta generacio de verkistoj, kiuj naskiĝis en la tujaj postmilitaj jaroj estas markita per uzo de fantasto. Plej junaj aŭtoroj multe malpli emas al fantasto kaj estas pli influataj de la militaj okazintaĵoj.'Ebria somero' de Delimir Reŝicki kaj 'La kakto' de Miljenko Jergoviĉ ambaŭ naskitaj en la sesdekaj jaroj pritraktas la militon en eks-Jugoslavio. 'Nokta laboro' de Stjepan Tomaŝ pri la krueleco de la dua mondmilito multe impresis min per la krueleco de milito, kiu reaperis tuj post la eldono de la novelo. La rakonto 'Ne pekas la plandoj' montras la rakontan talenton de Ivan Aralica, certe unu el la plej popularaj kroataj verkistoj. 'Barkoj el akvo' de Pavao Pavliĉiĉ, kiu donis sian titolon al la novelaro estas priliteratura novelo. El tiu titolo ni konkludas, ke la literaturo estas eta elĉerpaĵo el la ĉirkaŭanta mondo.


Mi citis kelkajn tekstojn, kiujn mi ŝatis, la noveloj estas kompreneble diversnivelaj kaj certe tedus doni tro da nekonataj nomoj al nekroata leganto. Li elektu mem kaj frandu tiun literaturan novaĵon. La tradukintoj estas famaj kroataj esperantistoj, kelkaj estas jam konataj de la eksterlandaj esperantistoj:Ivan Ŝpoljarec, Lucija Borĉiĉ, Maja Tiŝljar kaj pluraj aliaj. Indekso kun nomoj, naskiĝjaro kaj listo de verkoj esperante kaj originale feliĉe kompletigas la libron.La lingvaĵo samkiel la kompostado kaj prezento de la libro estas elstaraj, tute indaj je bonaj nacilingvaj eldonaĵoj. Mi ne notis pli ol unu lingvan eraron, krom ortografiaj eraretoj en citaĵoj el la angla kaj la germana, kio ankaŭ okazas en bonaj nacilingvaj libroj. En la enkonduka notico, Julija Matanoviĉ konkludas per la certeco, ke la leganto povos retrovi tiujn verkistojn en tradukoj al iu el la mondlingvoj en sia biblioteko. Ĉu ne tro optimisma? Bedaŭrinde literaturo de malgranda lando pene diskonatiĝas eksteren, se ĝi entute sukcesas eksportiĝi. Mi loĝas en granda franca universitata urbo kaj en niaj bibliotekoj ne trovis eĉ unu tradukon de iu ajn el tiuj verkistoj. Eble landoj kun pli da kontaktoj kun Kroatio havas kelkajn, sed pro tio ni devas substreki la pioniran rolon de tiu multflanke modela verko.

Robert Pontnau

S.A.T.  erinaco

DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

Ni ridu



Hodiaŭ estas dimanĉo! Mi venas atentigi vin, ke ne necesas veki min !



Forgesema kiel mi estas, mi forgesis mian pluvŝirmilon.